

**VERDA INFORMILO, n-ro. 2/2019, 19a de  
majo 2019**

**GRÜNER BOTE, 2/2019, 19. Mai 2019**

**estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio  
Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo  
Neubrandenburg (ESN)  
ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und  
EVN  
[www.esperanto-nb.de](http://www.esperanto-nb.de), [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)**

Finfine jen la nova Verda Informilo. Ĉar la redaktoro René ekde oktobro 2018 havas laboron, tio iomete daŭris. Reneo provos aperigi la sekvontan Verdán Informilon 3/2019 tre baldaŭ.

## **1. Societa kunveno en februaro 2019**

La 20-an de februaro okazis nia societa kunveno en la gastejo „Uns Eck“.

Temaro:

- saluto, interkonsento pri temoj,
- virinoj: hodiaŭ ni parolis pri la agado de juna lernantino el Svedio,
- Informo pri decido de la financa oficejo NB pro ĝia kontrolo de la jaroj 2015-2017,
- Prepozicio: pozicio aŭ direkto,

La kunvenon partoprenis naŭ samsocietanoj. Tri el ili faris interesajn prelegojn.

Jen kelkaj fotoj:



*Bildo 1: Manfred, Margarete, Brunjo, Birgit kaj Bernd*



*Bildo 2: Edeltraut prelegas*



*Bildo 3: Bernd, Reneo, Edeltraut kaj Vernereto*



*Bildo 4: Jen nia flageto kun kelkaj partoprenintoj*

## **2. Societa kunveno en marto 2019**

La 20-an de marto okazis nia societa kunveno en la gastejo „Uns Eck“.

Jen kelkaj fotoj:



*Bildo 5: Reneo montras la novan vortaregon de proferso Krause*



*Bildo 6: Margarete, Brunjo, Birgit kaj Bernd*



*Bildo 7: Edeltraut kaj Vernereto*



*Bildo 8: Vernereto kaj Vernerego*



*Bildo 9: Vernerego kaj Margarete*

### 3. Tago de la demokratio

La **1-an de majo 2019** ni denove okazigis informstandon. Ni tie informis interesulojn pri Esperanto kaj disdonis faldfoliojn.

Ĉijare ni estis triopo, kiu informis sufiĉe multe da interesuloj. Krome la aranĝo denove povis okazi sur la ĉefplaco de la urbo Neubrandenburg.

Jen kelkaj fotoj:



*Bildo 10: Edeltraut kaj René atendas la komencon*



*Bildo 11: René kaj Edeltraut antaŭpreparas la informstandon*



*Bildo 12: Edeltraut alnodos flagon*



*Bildo 13: René, Edeltraut kaj Werner*



*Bildo 14: La informstanda triopo*



*Bildo 15: Eĉ Bernd kaj Birgit vizitis nin*



*Bildo 16: Eĉ tre maljuna gastino foje aperis ĉe nia informstando, nome Ingeborg Neumann*

Ĉijare ni uzis kelkajn informplatojn, kiujn aranĝis Vernereto. Ili allogis sufiĉe da interesuloj.

Ni ne nur disdonis faldfoliojn, sed eĉ informilojn pri nia oktobra kurso. Ni do esperas, ke eble eĉ kelkaj aliĝos al la kurso.

## 4. Informo el Francujo

Ni ricevis informon retroŝte:

Saluton !

La Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono invitas vin al siaj someraj kursoj kaj aktivaĵoj, dum 7 ĝis 10 tagoj, en julio kaj aŭgusto

de lundo 8a ĝis ĵaŭdo 18a de julio: Maratona kurso kaj interŝanĝoj

Dennis Keefe (Usono, Ĉinujo): KUKO, nova Kurso Unesko-Kuriero

Marion Quenut (Okcitanujo): Esperanto-kurso « Ni kuneku ! » por komencintoj kaj progresantoj  
Interŝanĝoj de scioj kaj faroj en la franca lingvo

Caroline Mauboussin: Libro-bindado

Vidi la detalojn en [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2), aliĝo en [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho)

de mardo 6a ĝis vendredo 16a de aŭgusto: Infanoj, familioj, dancoj

Dennis Keefe (Usono, Ĉinujo) : Nova kurso pri la filmoj de Ĉarli Ĉaplin

Jean-Luc Kristos : Ludu ni por paroli iomete, multe, pasie !

aktivaĵoj por la infanoj kun Nicky, Larissa, Anastasia, Alain, Bert

tradiciaj popoldancoj kun Françoise

Vidi la detalojn en [gresillon.org/s4](http://gresillon.org/s4), aliĝo en [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho)

Bonvenon en Greziljono, F-49150 Baugé, [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

## Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.

[tlustulimu@web.de](mailto:tlustulimu@web.de) (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse:

[rene\\_philipp\\_ntz@gmx.de](mailto:rene_philipp_ntz@gmx.de)!)

Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29/0705

Tel. 0395 422 13 98

Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,

Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC:

NOLADE21NBS

e.-Brief: [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)

Esperanto-Verein Neubrandenburg e. V. (EVN)

DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705

Tel. 0395 422 13 98

e.-Brief: [info@esperanto-nb.de](mailto:info@esperanto-nb.de)